

Radioamatoroj kaj Esperanto

Antaŭ pli ol duonjarcento amatora radio komencis transsalti distancojn, landlimojn kaj vastajn oceanojn por doni al la ordinara homo teknikan kapablon por rekta voĉa kontakto kun iu ajn loko sur la tergloba.

Historia uzado de Esperanto por radioamatora komunikado komenciĝas sur radioamatora kongreso en Parizo en la jaro 1925 kaj per decido, kiun ĉi tiu kongreso akceptis por prospero de Esperanto. Pro multaj politikaj, ekonomiaj kaj organizaj problemoj antaŭ la dua mondmilito kaj baldaŭ post dua mondmilito, Esperanto inter la radioamatoroj multe ne disvastiĝis. Fundamenton por disvastigo kaj aplikado de Esperanto en radioamatora laboro metis en la jaro 1970 la 55a kongreso de Universala Esperanto Asocio en Vieno, kiam estis fondita ILERA - Internacia Ligo de Esperantistaj Radio Amatoroj.

La unuan fondan kunvenon partoprenis 14 esperantistoj radioamatoroj el 7 landoj. La idea fondinto de ILERA estis Aŭstria esperantisto radioamatoro Rudi Bartosch, OE 3 RU. S-no Rudi Bartosch mortis en la jaro 1973 sed lia ideo disvastiĝas inter radioamatoroj kaj esperantistoj. Kiel plej aktivaj radioamatoroj estas G 4 MR, W 2 CIL, F 5 RC, KH 6 GT, JR 1 TSGIPT 2 CA, UW 9 YE, UA 4 LBN, OK 1 AFZ kaj multaj aliaj.

En la jaro 1977 fariĝis ILERA faka grupo de USA kaj ĝis hodiaŭ havas pli ol 300 membrojn el ĉirkaŭ 50 landoj de la tuta mondo.

Ĉiujare en novembro ILERA organizas mondan radioamatoran konkurson sur mallongaj ondoj, kiu daŭras 48 horojn kaj dum kiu oni uzas Esperanton. Partoprenas stacioj el ĉiuj partoj de la mondo. Jam multajn jarojn oni aranĝas regulajn naciajn kaj internaciajn t.n. „kunvenojn en etero“ dum kiuj oni uzas Esperanton. La ideo de tiuj ĉi kunvenoj estas konvinki vastajn vicojn de radioamatoroj, ke artefarita lingvo Esperanto estas kapabla por praktika komunikado kaj ke Esperanto estas lingvo per kiu oni povas facile solvi nunajn lingvajn problemojn

inter unuopaj nacioj. Tiun ĉi realan fakton dokumentas jam tio, ke Esperanto post pli ol 90 jaroj de sia ekzistado fariĝas pli kaj pli multe uzata lingvo, kaj nome ne nur por tradukoj de klasika kaj teknika literaturo, sed ankaŭ en praktika internacia kontakto.

LS/BIZ